

Esperanto

v. 1911/2004/2005

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kaj (UHA)

# Oomoto

n-ro 451,452  
2004, 2005  
j a n - d e c



ISSN 0388-0672

Enhavo

La 80a Jubileo de Onisaburo-Misiado en Mongolio ..... 1  
 La 80a Jubileo de Oomoto-Misiado en Brazilo ..... 10  
 Saluto de spirita gvidantino (Kurenai Deguĉi) ..... 12  
 Saluto de ĉefdirektoro de Oomoto (Kunihiko Ŝimamoto) ..... 12  
 Saluto de ĉefdirektoro de Oomoto (Kunihiko Ŝimamoto) ..... 14  
 Demandoj kaj respondoj pri Oomoto ..... 16  
 "Fidele al elkora krio" Konvinkiĝo de Vivĝojo (3)  
 (Hidemaru Deguĉi, tr. Eizo Ito) ..... 28



Ĉousej-den: AJABE



Banŝou-den: KAMEOKA

La kovrilo: Montoĉeno Tatejama · montego Okudainiĉi

<Micugi Deguĉi>

Ekleviĝas supren la vualita nebulo, kaj aperigis sin la montego Okudainiĉi prilumigita en posttagmezaj sunradioj.

# Oomoto

Oficiala organo  
 de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai  
 (Universala Homama Asocio — UHA)  
 Esperanta Fako de UHA,  
 Ten'on-kjoo, Kameoka-ŝi,  
 Kioto-hu, 621-8686 Japanio

Abonprezo ĉe Oomoto: aere: 1200 enoj jare  
 surface: 1000 enoj jare  
 Poŝtgirkonto: 01030-6-25637 "Oomoto Honbu"  
 Telefono: + 81 (771) 22-5561  
 Telefakso: + 81 (771) 25-0061  
 Interreto: esperanto@oomoto.or.jp  
<http://www.oomoto.or.jp/Esperanto/index-es.html>

Fondita en 1925  
 Numero 451/452: 2004, 2005 januaro–decembro

Eldonejo: Ten'seiŝa  
 Administranto: Tokio Kanakogi  
 Redaktoro: Masamiĉi Tanaka

Perantoj:

UEA  
 Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam  
 Nederlando rete: uea@inter.nl.net

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA)  
 PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono  
 tel: +1 (510) 653-0998; fakso: +1 (510) 653-1468  
 rete: elna@esperanto-usa.org

Sveda Esperanto-Federacio:  
 c/o s-ino Lisbet ANDREASSON  
 Södra Rörum, Husarlyckeŝvagen 29  
 SE-242 94 Hörby, Svedio  
 tel: (0415) 50152

Brazila Esperanto-Ligo (BEL)  
 Caixa Postal 03625, BR70084-970 Brasília DF,  
 Brazilo.  
 tel: (061) 226-1298; fakso: (061) 226-4446  
 rete: bel@esperanto.org.br

Ĉeĥio: s-ro Vladislav HASALA  
 Dvořákova 1, CZ-696 62 Strážnice, Ĉeĥio.  
 tel: +420 (518) 332-278; fakso: +420 (518) 332-507  
 rete: vlada\_hasala@iol.cz

Hungario: s-ro SZABADI Tibor  
 Pf. : 66. H-8801 Nagykanizsa, Hungario  
 rete: esptibor@pro.hu

Irano: Irana Esperanto-Centro  
 P.O. Kesto 17765-184, Tehran - 17, Irano  
 tel kaj fakso: +98 (0211) 7437138  
 rete: esperanto.ir@esperanto.org

Danio: La LibroServo de DEA  
 c/o s-ro Arne Casper  
 Bryggervangen 70, 4.tv  
 DK 2100 Kopenhago, Danio  
 tel: +45 39 20 63 48 k. +45 21 40 84 87  
 rete: arne-casper@email.dk

>> Dezirantoj pretaj esti perantoj, bv sin anonci al ni (adreso ĉe la kolofono supre).

Дэгуĉи Онисабуро багшийн Монголд зочилсоны 80 жилийн өд-  
 лын харилцааны тухай илтгэл - Сайн санааны хандивын тогло

## La 80a jubileo de Onisaburo-misiado en Mongolio




En 1924 nia majstro Deguĉi Onisaburo kaj kelkaj akompanantoj ekvojaĝis, ili celis la ĉefurbon de Mongolio kun espero de monda paco, kiu surbaziĝas sur la religia kaj morala unuigo de Azio. Tiam Onisaburo estis en provizora reliberiĝo pro la unua Oomoto-afero. Kaj tiam en Ĉinio kaj en Mongolio estis bataloj, kaj Onisaburo kaj la akompanantoj estis kaptitaj en la urbo Pajntara(ĉina nomo Tongliao), kaj trude resenditaj al Japanio.

Post 80 jaroj por daŭrigi kaj progresigi la esperon de Onisaburo Oomoto kaj Ĵinruiaizenkai planis la karavanon, kiu konsistis el 177 membroj kaj inter ili troviĝis ankaŭ la kvina gvidantino de Oomoto. La karavano vizitis Mongolion de la 19a ĝis la 26a de Julio, 2004.

La membroj de la karavano kaj La Templo Gandantegchenling, kiu estas la unua templo de la Mongola Budhismo, kunhavis la komunan konsolan feston por ĉiu animo de la mortinto pro nenatura morto en ĉiu lando, por paco de la mondo. Ili ankaŭ kunhavis benefican koncerton, kaj kunhavis la kunvenon por interkoni la kulturojn japanan kaj mongolan. Tiel ili metis la unuan paŝon por la paco de la mondo kaj por interkoni reciproke ambaŭ kulturojn.





La estraranoj de la karavano konsistas el tiuj, la kvina gvidantino de Oomoto aŭ superprezidanto de Ĵinruiaizenkai, s-ro HIROSE Jasumi la honora karavanestro la prezidanto de Oomoto aŭ honora prezidanto de Ĵinruiaizenkai, s-ro ŜIMAMOTO Kunihiko la karavanestro la ĉefestrarano de Oomoto, la laborantoj en oomoto-centro funkciis kiel la karavanaj sekretarioj. Tiel la karavano konsistis el tuta organizo de Oomoto.

Ankaŭ neomotanoj sed simpatiantoj partoprenis: la superhonora estro de la karavano estis UEDA masaaki, honora profesoro de la universitato Kioto; la honora estro de la karavano estis JAMADA Saburo, la prezidanto de la manifestacia societo por DEGUĈI Onisaburo. 14 membroj de tiu societo ankaŭ troviĝis en la karavano. Kaj kunvojaĝis tutajn vojaĝtagojn ĵurnalistoj de religiaj ĵurnaloj: Kĵouto-Ŝimbun, Ĉuugainippou, Bukkjou Times.

La 18an de junio post ĉiutaga vesperpreĝo, en la preĝejo Banšouden en la centro de Oomoto en Kameoka, ili havis feston por preĝi senakcidentan vojaĝon al Dio.

Je la sesa matene la 19an, la kvina gvidantino, la sekretarioj de la karavano, membroj de la karavano loĝantaj proksime

de Kameoka ekvojaĝis. La tuta membraro de la karavano renkontis sin en la flughaveno Narita, tie ĉiu procedis por eliri el la lando. Post tio en la flughaveno ili havis ceremonion formi karavanon.

Je la 2a posttagmeze la aviadilo de Mongolia Fluglinio, kies flugnumero estis OM502, ekflugis de Narita, pere de Incheon Internacia flughaveno de Koreio, post la 8a posttagmeze alflugis al Ulaanbaatar Internacia flughaveno de Mongolio, tiam ankoraŭ la suno lumis la stepon.

### Ni vizitis ekstombejon de japanoj

Antaŭtagmeze en la 20a ni vizitis ekstombejon de japanoj, kiu estas en ĉirkaŭurbo de Ulaanbaatar. Post la dua mondomilito Sovetunio retenis ĉirkaŭ 14000 militkaptitojn japanajn en Mongolio kaj devigis ilin fari pezajn laborojn, inter ili 1600 japanoj mortis onidire.

En tiu tombejo estis enterigitaj 835 japanoj, kaj poste iliaj ostoj estis portitaj al Japanio, kaj nun tie staras la turo por ilia konsolo.

Amatunorito estis recitata de la membroj de la karavano sub la gvido de la kvina gvidantino por preĝi feliĉajn vivojn de la viktimoj en la ĉiela regno.



### Ni vizitis la Templon Gandantegchenling

Post tio la gvidantino, la prezidanto de Oomoto HIROSE, la ĉefestrarano de Oomoto ŜIMAMOTO, estraranoj de Oomoto, kaj aliaj entute 17 oomotanoj vizitis la Templon Gandantegchenling, la unuan templon de mongola budhismo, aŭ la centron de la mongola budhismo. Ili pilgrimis en la templo, kaj ĉeestis en la bankedo, por kiu ilin invitis la templo, kies ĉeestantoj gravaj estis jenaj: D. CHOIJAMTS la estro de la templo Gandantegchenling, AMGALAN YO la vicestro de la templo, ĴAJAMA la estro de la administra fako de la templo, BULGAN la vicprezidanto de packonferenco de aziaj budhismoj, GUNDESANBU la estro de la templo Khongachoiling, BĴANĴAB la vicprezidanto de la budhisma universitato Zabazaru, WADEMUTIGU la estro de internacia fako.

La unua salutis D. CHOIJAMTS la estro

de la templo Gandantegchenling,

“Mi tre ĝojas, ĉar tiom multe da japanoj vizitas nin. En 1992 Mongolio demokratiigis kaj enkondukis kapitalismon, post tio ni havis malfacilajn jarojn, tiam Japanio helpis nin, mi elkore dankas pro tio. De nun interreligiaj kunlaboroj pli multe okazos. Japanio kaj Mongolio, ambaŭ havas similajn kulturojn, tradiciojn, kaj komunan spiritecon surbazitan sur azia budhismo. Estas tre brile, ke Japanio evoluadas ekonomie, dume konservas japanajn tradiciajn kulturon kaj religiojn.”

Responde esprimis dankemon nia gvidantino pro la kunlaboro de la templo Gandantegchenling por havi la komunan konsolan feston por ĉiu animo de la mortinto pro nenatura morto en ĉiu lando, por paco de la mondo.

De Oomoto al la templo Gandantegchenling transdonis kontribuojn, por tio D. CHOIJAMTS la estro de la templo danke salutis,

“Mi tre dankas por tio. Ni uzos ĝin por konstrui templon de mongola budhismo en Budhgajo, Hindio.”

### Honora profesoro UEDA prelegis pri kulturoj japana kaj mongola

De la 2a kaj duono posttagmeze ni, Ĵinruiaizenkai kaj la templo Gandantegchenling, kunhavis malfermitan prelegon kaj benefican koncerton por helpi infanojn malriĉajn, en “la kultura palaco” kiu troviĝas proksime al la domo de la prezidento en la urbocentro Ulaanbaatar.

Sur ekstera muro de la kultura palaco super la enirejo oni pendigis grandan desegnaĵon por informi la koncerton. Sur ĝi oni metis la foton de DEGUĈI Onisaburo kun tiuj de modernaj kantistinoj kaj kantistoj popularaj en Mongolio. Tia ne atendita kunmeto tre surprizis la membrojn de la karavano.



Ĉe la malfermo ĉefestrarano de Oomoto ŜIMAMOTO parolis pri la historio kaj la movado de Ĵinruiaizenkai, kaj salutis,

“Mi elkore deziras, ke tiuj ĉi okazaĵoj de nia karavano plifortigu la amikecon inter Mongolio kaj Japanio kaj tio estu ponto al — la mondopaco—”.

La honora profesoro de la universitato de Kioto UEDA prelegis pri “Popolaj interŝanĝoj inter mongoloj kaj japanoj”. Li priparolis pri la teorio, ke japanoj devenas de la rasoj ĉevalrajdintoj de la kontinento. La teorion asertis la honora profesoro de la universitato de Tokio, EGAMI Namio. UEDA ankaŭ menciis, en japanaj kulturoj troviĝas multaj aferoj devenintaj el mongolaj kulturoj: Jabusame, pafado per pafarko de surĉevalo kuranta; Sumoo; la legendo pri la luna princino el bambuo.

En la epoko Kamakura(1192-1333) Mongolio atakis Japanion dufoje, tamen ankaŭ post tio komercado inter du landoj prosperis, tiom la interrilato de du landoj estis forta de malnova tempo.

Li akcentis interfluojn de popoloj, en kiuj unu rilatas kun la alia kiel unu sendependa homo. Li parolis, “Mi kredas, ke pliprofundigi interŝanĝojn inter du popoloj, mongoloj kaj japanoj, multe kontribuos por la paco kaj amikeco de Azio.”

Post tio la koruso de Oomoto prezentis kantojn de Oomoto, “Fundamenta himno de Oomoto” “Gloro” “La mondo de amo kaj bono”, ili donis freŝan etoson al 1200 ĉeestantoj en la halo.

#### **Benefica koncerto**

Post ripozo en la halo ni havis benefican koncerton. Oyunnna, mongola kantistino laboranta kaj populara en Japanio, kantis du kantojn. Sekvis kantistinoj popularaj inter gejunuloj, Sarantuya, Serchmaa, Naran. Ankaŭ du grupoj de viroj, nome Nomintalst kaj Camerton prezentis sin kaj varmigis la halon. La lasta kanto estis “La papergruo de knabino en Hiroŝimo”, tutlande populara en Mongolio. La kanton kantis Oyunnna kune kun nia gvidantino sur la scenejo.


Ĉe la fermo de la koncerto Oyunnna salutis,

“Mi elkore bonvenigas vin. Hodiaŭ amikecaj koroj de vi, via gvidantino kaj la membroj de la karavano, donis grandan kortuŝon al la popoloj de Mongolio”.

La gvidantino donacis bukedon al Oyunnna en plenaj manfrapadoj.

Je la 5a la koncerto fermiĝis.

#### **Preĝo por paco kaj komuna festo konsoli ĉiun animon de mortinto pro nenatura morto**



La 21an de Junio, ĝuste en tiu tago antaŭ 80 jaroj DEGUĈI Onisaburo estis kaptita en Pajntara.

Je la 10a antaŭtagmeze en la preĝejo Kongachoiling de la templo Gandantegchenling ni havis la feston por preĝi mondopacon kaj por konsoli ĉiun animon de mortinto pro nenatura morto.

En la preĝejo estis ĉefstatuo de Budho, kaj ankaŭ estis la statuo de Zanarbazar, kiu estis la unua vivanta budho kaj artisto en Mongolio.

Kun la muziko de Jakumokotooj la gvidantino, ĉefa diservanto DEGUĈI Kyotaro, vica diservanto DEGUĈI Hisao, aliaj diservantoj, kaj la estro de la templo Gandantegchenling D. CHOIJAMTS kaj aliaj eminentaj bonzoj eniris la preĝejon. Kaj la festo okazis jene.


La unua estis purigado por oferaĵoj kaj ĉeestantoj. Sekve la ĉefa diservanto recitis la preĝvortojn por la mondopaco antaŭ la altaro. Kaj sub la gvido de la gvidantino ĉiu recitis Amatunoriton.

Kaj okazis festo konsoli ĉiun animon de mortinto pro nenatura morto en tuta mondo, vica diservanto alvokis la animojn. Dum la diservantoj okupis sin je ceremonio oferi manĝaĵojn al la altaro, la gvidantino preparis teon verdan en kvar tasoj

teceremonie, ŝi ilin oferis al la statuo de Avalokiteŝvaro en la templo Gandantegchenling kaj al la ĉefstatuo de budho en la preĝejo Kongachoiling pere de la manoj de s-ino HIROSE Asako sekve al diservantoj de Oomoto trans bonzoj de la templo. Kaj la aliaj du tasoj estis oferitaj al la altaro de la Dio kaj al la altaro de alvokitaj animoj pere de s-ino HIROSE Asako kaj la vica diservanto.

La ĉefa diservanto recitis preĝajn vortojn por la festo konsoli ĉiun animon de mortinto pro nenatura morto en tuta mondo. Kaj S. Tsedendammba, la ĉefo de konsila fako pri religioj por la prezidento, eldiris “la vortoj por paco kaj por konsoli la animojn”. Sekvis la preĝo de mongola budhismo per solena recitado de sutro kun akompano de cimbalo kaj granda trumpeto en propra ceremonimanagero. Post tio festo okazis oomotostila, en kiu oferis pinbranĉojn, kiuj simbolas la materialojn por konstrui preĝejon de la Dio aŭ la animoj. Oferis ilin la gvidantino, la ĉefa diservanto, la eminentuloj de la templo kaj la rilataj personoj en Mongolio, kaj la reprezentantoj de la karavano. Sub la gvido de la gvidantino ĉiu recitis “Kamigoto”, bonzoj de la templo recitis sutron. En la fino de la festo ni sendis la animojn al la ĉielo, la spirito de la Dio ankaŭ ĉieliris.





Post la festo la membroj de la karavano kaj la rilatuloj de la templo kune fotiĝis antaŭ la ĉefa preĝejo de la templo Gandantegchenling.

Kaj en la korto de la budhisma universitato Zanabazar la gvidantino plantis hondoan piceon por memoro, apude starigis memortabulon.

### **La bankedo kun japanaj kaj mongolaj kulturaj prezentaĵoj**

Ĉe la malfermo filmojn kaj fotojn de DEGUĈI Onisaburo prezentis Oomoto sur la ekrano de la scenejo. Ili estis fotitaj je la alveno de Onisaburo al Mongolio antaŭ 80 jaroj, kaj montris reale tiaman staton de Mongolio kaj la movadon de Onisaburo.

En la malferma saluto D. CHOIJAMTS la estro de la templo Gandantegchenling parolis,

“Ni havis la feston hodiaŭ en granda sukceso. Ni, japanoj kaj mongoloj, povos kune havi tian feston ankaŭ en la estonteco por paco de tuta homaro.” Sekvis la saluto de la gvidantino kiel honora prezidanto de Ĵinruiaizenkai. AMGALAN la vicestro de la templo gvidis tosti. Salutis la eminentaj gastoj el Mongolio, S. Tsedendammba, la ĉefo de konsila fako pri religioj por la prezidento, SMAHU la vicurboestro de la

urbo Ulaanbaatar. Dume sur la scenejo japanoj prezentis teceremonion kaj gustumis ĝin la gastoj el Mongolio. Kaj sur la scenejo la gvidantino kaj D. CHOIJAMTS la estro de la templo Gandantegchenling, kiel la reprezentantoj de Ĵinruiaizenkai kaj la templo Gandantegchenling, interŝanĝis la memoraĵojn.

### **Transdonis kontribuojn**

Al la lernejoj kaj institucioj, kiuj funkcias por socialaj bonoj por malriĉaj geknaboj kaj gejunuloj, kaj kiuj estas nomitaj de la registaro kaj de la urbo Ulaanbaatar, tansdonis la kontribuojn de la fonduso Aizen.

ŜIMAMOTO la ĉefestrarano de Oomoto transdonis ĝin al s-ro NARANĈIMEGU, la lernejestro de la 29a speciala lernejo por elementaj mezaj kaj altaj lernantoj ŜIMAMOTO transdonis ĝin ankaŭ al s-ro ERDENETONGURAG, la reprezentanto de la ekzerca centro de teknikoj por havi laborojn.

De s-ino NAKAJIMA Ĉizuko la prezidanto de la organizo por oomotaninoj al s-ro HAŜIŜI la estro de la centro por kuraci kaj protekti geknabojn, kaj al s-ro BATDURAM la estro de la centro por kuraci kaj ekzerci geknabojn handikapitajn.

De s-ro AGOU Takaŝi, la prezidanto de la organizo por oomotanoj kun aĝoj inter 30 ĝis 50, al s-ino TSEVEEN la reprezentanto de la centro koncerne al la rajtoj de mongolaj geknaboj NGO, kaj al f-ino OYUNNA, s-ro DAWADORGOR la ĉefestrarano de la fonduso por geknaboj “OYUNNA”. Tiu ĉi kontribuado estis la frukto de benefica bazaro okazigita de la organizo en “Galerio KAMEOKA” en la urbo KAMEOKA, la 4an de majo.

### **La mesaĝon de la estro de la urbo KAMEOKA oni transdonis al la estro de la urbo Ulaanbaatar**

ŜIMAMOTO la ĉefestrarano de Oomoto anstataŭlegis la mesaĝon de s-ro KURIJAMA Masataka la estro de la urbo KAMEOKA, kiu estis sendita al s-ro EMHUBORDO la estro de la urbo Ulaanbaatar. “La urbanoj de KAMEOKA deziras kontribui por realigi mondopacon, por realigi brilan estontecon, kune kun Mongolianoj kaj urbanoj de Ulaanbaatar.” ŜIMAMOTO transdonis la skribaĵon de la mesaĝo al s-ro SMAHU la vicestro de la urbo Ulaanbaatar. Ankaŭ li transdonis desegnaĵojn kaj manlaboraĵojn fare de la infanoj en la protekta institucio por infanoj “AOBAGAKUEN” por pliprofundigi amikecon kun la infanoj en Mongolio.

SMAHU la vicestro de la urbo

Ulaanbaatar responde salutis, kaj sugestis esti ĝemelaj urboj KAMEOKA kaj Ulaanbaatar.

“La urbo Ulaanbaatar havas multajn ĝemelajn urbojn en Japanio, mi tre ĝojas, ke ĉifoje aldonos al ili la novan urbon. La desegnaĵojn de japanaj infanoj mi alportos al la infanoj en infaninstitucioj por sociala bono”

Sekvis gastoparoloj: UEDA Masaaki la honora profesoro de la universitato Kioto; JAMADA Saburo la prezidanto de la manifestacia societo por DEGUĈI Onisaburo; KANI Koei la eksĝenerala sekretario de la japana budhisma skolo Tendai.

### **Kultura kunveno japana kaj mongola**

Sekve ni havis kulturalan kunvenon. La unua prezentaĵo estis la muziko de Jakumokotoo, nome “Konohana”. La unua de mongola prezentaĵo estis murinhuur, sola ludado “La sonoj de hufoj”, kvaropa ludado “Apud la lago kun floroj”.

Ŝimajoj “Hagoromo” “Kantan” de la membroj el la karavano Hooŝoo-skole prezentis.

S-ro DARINJAMU naskita en la regiono HOBDO, kie estas la origino de Khoomii, la mongola propra popolkantado elvoĉi



samtempe altan kaj malaltan voĉon, prezentis Khoomii. Kaj ankaŭ la kantojn li prezentis kun akompano de murinhuur: "Kvar specioj de Khoomii", japana infankanto "Ruĝaj libeloj".

Kaj la koruso de Oomoto prezentis kantojn de Oomoto: "Gloro" "La mondo de amo kaj bono".

Je la fino de la kunsido salutis HIROSE la honora prezidanto de Oomoto, kaj AMGALAN YO la vicestro de la templo Gandantegchenling.

HIROSE parolis,

"Kia koincido! Hodiaŭ estas ĝuste tiu tago, en kiu tago DEGUĈI Onisaburo estis kaptita en la urbo Pajntara antaŭ 80 jaroj. En tiu tago hodiaŭ ni, Ĵinruiaizenkai kaj la templo Gandantegchenling, povis kunhavi la komunan feston preĝi mondopacon kaj konsoli ĉiun animon de mortinto pro nenatura morto. Ni povis havi tiun historian okazaĵon sub la protektoj de la Dio kaj Budho, kaj pro senlimaj favoroj kaj subtenoj de la estro de la templo kaj de aliaj multaj personoj. Mi elkore multe dankas vin."

"Kaj mi ege ankaŭ dankas vin kaj mi sentas honoron, ĉar inter Japanio kaj Monogolio, inter la urboj Kameoka kaj Ulaanbaatar, la amikeco pli antaŭeniris."

"Nun mi volas realigi la celon, kiun DEGUĈI Onisaburo montris kiel la idealo: per solidareco kaj kunlaboro super la diferencoj de rasoj, religioj, ŝtatoj ni povos realigi veran mondopacan ordon."

AMGALAN parolis,

"Antaŭ 2500 jaroj la Budho instruis amon kaj kompaton al la homaro, ankaŭ la homaro priparolis pri ili. Mongoloj alte taksis grandanimecon kaj rilaton kunprosperan por aliaj religianoj. Ekzemple CHINGHIS Khan alvenigis pacon al la mondo. En la 16a jarcento ZANABAZAR la unua vivanta budho de mongola budhismo daŭre preĝadis por la mondopaco. Tiu tradicio estas heredita en la templo Gandantegchenling, kaj ni preĝas por la paco kune kun la religianoj de ĉiuj landoj en la mondo. Ni esperas, ke tia kunlaboro, kian ni ĵus havis, pliprosperu kaj tio portu feliĉojn al popoloj."

Kaj ni fermis la kunsidon.

### Teceremoniis sur stepo de Mongolio

La 22an de junio la karavano vizitis la stepon UNBURDOB en la nacia parko BOGDO 47 kilometrojn sude de la urbo Ulaanbaatar. Tie ni teceremoniis. Ĉe laejo de teceremonio ni metis la foton de la majstro Onisaburo, kiu surraĵdas sur blanka ĉevalo

en ĝi. JANO Acuko membro de la karavano ceremonie preparis la teon. Kaj la unuan bovlon de teo oferis la gvidantino antaŭ la foto.

Sur la stepo ni faris kvar ejojn de teceremonio per maldikaj metaĵoj. Inter la vastaj ĉielo kaj tero unu bovlo da teo donis lumon al la membroj.

La teceremonion vizitis 13 mongolaj esperantistoj, ili amikiĝis kun japanaj esperantistoj havante teon.

Kaj ĉirkaŭe floris alpaj plantoj, CUGARU Ŝunsuke la estro de botanika ĝardeno de Oomoto gvidis membrojn ĝui ilin.

### Ni memorplantis

De la 3a kaj duono en tiu tago ni memorplantis en tereno kie oni konstruos la amikecan parkon inter Japanio kaj Mongolio. La loko situas proksime de la centra stadio, kie okazas la nacia okazaĵo de Mongolio Naadam: Sumoo mongolstila, ĉevalkonkurso, kaj arkopafado. La karavanon bonvenigis kun ĝojaj vizaĝoj la infanoj de orfejo, kiu funkcias pro la porinfana fonduso OYUNNA.

La gvidantino memorplantis larikon kaj oni metis apud tiu la memortabulon, la membroj memorplantis 120 idojn de pino kaj hondona piceo, sur kiuj oni metis la

nomkartojn. La plantidojn zorgos la infanoj de la orfejo sub la fonduso OYUNNA.

### Turismo al la malnova ĉefurbo de Mongolio

Ĉar ni finis ĉiujn okazaĵojn en la ĉefurbo Ulaanbaatar, la 22an matene 88 membroj de la karavano ekveturis al Kharakhorin por ĝui 3 tagan turismon okcidenten 280 kilometrojn de Ulaanbaatar. Kharakhorin estis la ĉefurbo de Mongolio en la 13a jarcento, nun ni vidas tie la templon Erudene Zuu konstruitan en la 16a jarcento.

La gvidantino havis unutagan turismon al Kharakhorin per helikoptero.

Dume 88 membroj havis dutagan turismon viziti la stepon Doganahado kaj ankaŭ turismis en la urbo Ulaanbaatar.

La karavano ekflugis je la 8a matene en la 26a de junio per Mongolia Aerlinio, flugnumero OM501, revenis al Japanio.

La okazaĵojn, kiujn havis la karavano en Mongolio, informis televido kaj ĵurnaloj en Mongolio kiel gravaj okazaĵoj enlande. Ankaŭ la ĵurnalistoj, kiuj kunvojaĝis kun la karavano, rapide informis pri ili sur siaj ĵurnaloj en Japanio.



# La 80a Jubileo de Oomoto-Misiado en Brazilo



80 jaroj pasis de kiam la familio de s-ro Terukiĉi Ojama, misiisto de Oomoto, enmigris en Brazilon en 1924. La Spirita Gvidantino Kurenai Deguĉi kaj la karavano de 87 Oomotanoj vizitis Brazilon por festi la 80jaran jubileon de Oomoto-misiado en Brazilo. En tiu okazo, oni ankaŭ gratulis la malfermon de “Oomoto Internacia,” la nova oficejo de Oomoto en la ĉefurbo Brazilo.

## **Oomoto Internacia**

S-ino Ursula Grattapaglia, iama estrarano de UEA, kaj ŝia edzo Giuseppe Grattapaglia partoprenis en la monda konferenco de Internacia Rotario en la urbo Kobe en majo kiel la reprezentantoj de Rotarianoj en Brazilo. Tiam s-ro Ŝigeki Maeda el Oomoto renkontiĝis kun ili kaj informis al ili pri la 80jara jubileo de Oomoto-misiado en Brazilo, kaj pri la vizito de Spirita Gvidantino al Brazilo por tiu jubileo. S-ino Ursula proponis la viziton de Spirita Gvidantino al ĉefurbo Brazilo, ŝi ankaŭ proponis la establaron de oficejo de Oomoto en Brazilo.


Kiam ŝi ricevis la libron “Diaj Revelacioj” de Fondintino Nao Deguĉi, ŝi legis la vortojn, “Mi jam diris ke ĉi tiu Dia afero komencos disvolviĝi el malproksima lando,” kaj

ŝi sentis, ke tiu profetaĵo temas pri Brazilo, kaj ŝi proponis la establaron de la oficejo de Oomoto en Brazilo.

Tiu projekto rapide progresis, kaj Oomoto akiris la domon kaj establis novan oficejon nomata “Oomoto Internacia” en Brazilo. La oficejo situas en la duoninsulo enbrakumata de la norda lago. Ges-roj Grattapaglia kaj aliaj esperantistoj en Brazilo kaj ĝiaj ĉirkaŭurboj forte subtenis tiun projekton, kaj fervore helpis kaj kunlaboris por ĝia realiĝo.

Dum tiuj jaroj la eksterlanda ŝlosilpunkto de Oomoto-misiado troviĝas nur en Brazilo t.e. la Sudamerika Centro de Oomoto en *Jandira*, Sao-Paŭlo. La stablo de “Oomoto Internacia” en la ĉefurbo de Brazilo provizos la bonan okazon por la disvastiĝo de la instruoj kaj ideoj de Oomoto al la mondo. Brazilo estas internacia urbo kie troviĝas la Brazilaj registaraj oficejoj kaj alilandaj ambasadoj, kaj gravuloj el ĉiuj nacioj kaj kampoj kolektiĝas, tial la nova oficejo en Brazilo plenumos la grandan rolon por la informado kaj misiado de Oomoto al la mondo.

En la unua de decembro vespere, oni solenis la purigan riton de la tuta domo kaj konsekris la altaron en la “Oomoto Internacia”



kun la ĉeesto de Spirita Gvidantino.

En la 3a de decembro matene, membroj de la karavano vizitis la domon de “Oomoto Internacia” kaj celebris la malferman ceremonion: Spirita Gvidantino, s-ro Kunihiko Ŝimamoto, ĉefdirektoro de Oomoto-Centro, kaj s-ino Ursula Grattapaglia solene tranĉis la rubandojn.

## **Memorfesteno**

La 3-an de dec. vespere oni celebris la memorfeston de la malfermo de “Oomoto Internacia” en la *Convention Hall* de *Blue Tree Park Hotel Brasilia*. Ĉe la enirejo de la halo, Spirita Gvidantino, s-ro Ŝimamoto, ĉefdirektoro de Oomoto-Centro, kaj s-ro Kyotaro Deguchi, konsilisto al Oomoto-Centro, bonvenigis ĉiujn gastojn je ilia alveno.

La halo malfermiĝis ĉirkaŭ la 8a vespere, tiam oni ripete projekciis sur la ekrano per DVD la filmon, “Historio de Oomoto” kiu prezentas la Fondintinon Nao Deguĉi, Kunfondinton Onisaburo Deguĉi kaj sinsekvajn Spiritajn Gvidantojn.

S-ro Jose Carlos Dorini Ramos, eksvicprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, prezidis la feston.

Unue s-ro Ŝimamoto, la ĉefdirektoro de Oomoto-Centro, due s-ro Maeda, la direktoro de “Oomoto Internacia,” dankis por la fervoraj subtenoj kaj kunlaboro de la esperantistoj kaj spiritistoj. Ankaŭ Spirita Gvidantino salutis. Ŝian saluton kaj aliajn salutojn ni aparte publikigas en tiu ĉi artikolo.

Post tiuj salutoj, oni projekciis sur la ekrano per DVD la filmon, “Uta-festo—belo de ĉiela regno, preĝofero por mondopaco.” Uta-festo estas karakteriza ceremonio de Oomoto kun la recitado de poemoj versitaj de la Spiritaj Gvidantoj kaj membroj de Oomoto, kaj ĉiuj poemoj estas preĝo por mondopaco kaj pliboniĝo de la socio.

Dum iom da tempo, ĉeestantoj prenis vespermanĝon en bufedstilo, kaj oni prezentis la

## Saluto de Spirita Gvidantino

Estimataj kaj karaj ges-roj,

Mi esprimas elkorajn ĝojon kaj dankon pro tio ke mi vidas tiom multajn gastojn el diversaj kampoj en Brazilo.

Nu, Oomoto estas revelacia religio fondita tiel ke la Dio kreinta ĉi tiun mondon posedis Fondintinon kiu tiam estis analfabeta, malriĉa vidvino. Ĉi tiu Dio montris kia estas la feliĉa mondo ideala por homaro. Por realigi ĉi tiun idealan mondon, mia praavo Deguĉi Onisaburo enkondukis Esperanton en 1923, kaj komencis la agadon sur la internacia scenejo kunlabore kun aliaj religioj. En tiu sama jaro li sendis en ĉi tiun kontinenton Brazilo, specialajn misiistojn el Oomoto por komenci disvastigi Diajn instruojn. Kalkulante de tiu jaro, ĉi-jare ni vidas la okdekan datrevenon.

En nia lando Japanio, la cifero ok havas tre gratulan signifon ke ĉio pli kaj pli progresas. En ĉi tiu gratula jaro, en Sud-Amerika Centro de Oomoto en Jandira, San Paulo, finkonstruiĝis la nova templo kaj en la kvina de decembro, postmorgaŭ, okazos la inaŭguro kaj mi nun havas grandan emocion, ĉar hodiaŭ post okdek jaroj Oomoto faras unuan paŝon de la agado en ĉi tiu sankta metropolo Brazilia laŭdire konstruita laŭ sankta profetaĵo.

En Diaj Revelacioj de Fondintino antaŭ cent dek du jaroj troviĝas jena tre mirinda frazo: Ĉio komencos disvastiĝi de la plej malproksima lando. La plej malproksima lando disde Japanio estas ĉi tiu lando Brazilo. Ĉe ĉi tiu frazo mi restas kun granda espero ke se en Brazilo disfloros kaj prosperos la agado pri la internacia lingvo kaj ĝia spirito, tio certe disetendiĝos al la ideala mondo de la homaro. Mi do deziras klopodi kune kun vi por la realigo de tia mondo.

Mi nun sentas senkompare grandan ĝojon kaj dankon, pro tio al mi prosperas vidi la ĉeeston de estimataj gastoj kaj profundigi la amikecon kun vi ĉiuj, kaj krome ni havas honoron prezenti al vi la japanajn tradiciajn artojn fare de la membroj de la karavano. Bonvolu senĝene amuziĝi ĝis la lasta momento, mi petas.

Koran dankon.

Gratulkunveno memore de la fondo de Oomoto Internacia

## Saluto de Ĉefdirektoro de Oomoto

Mi elkore dankas vin, ĉiujn invitojn kiuj partoprenis malgraŭ okupiteco privata kaj oficiala.

La nomo "Oomoto Internacia" estas tre sopira nomo por kredantoj. La Kunfondinto Majstro Deguĉi Onisaburo adoptis Esperanton en 1923. Kune kun tio li komencis kunlabori kaj interflui kun justaj kelkaj religioj, kiuj naskiĝis en multaj landoj en la mondo kaj misiadis revelaciojn. Kaj en 1924 por realigi mondopacon li vojaĝis cele al Mongolio stepa tero malproksimega, kiu troviĝas en centro de Azia kontinento. Post kiam Majstro revenis al Japanio, en sanktejo Ajabe, naskiĝloko de Oomoto, li tuj fondis fakon por internacia disvastigo kaj komencis disvastigi la instruojn de Oomoto al la mondo per Esperanto. Kaj li sendis al Eŭropo sian disciplon, kiu estis esperantisto, fondis Eŭropan Centron en Parizo en Francujo, kaj disvastigis Dian doktrinon en la tuta Eŭropo.

La nomo de Eŭropa Centro tiam fondita estis "Oomoto Internacia". De tiam okdekjaroj pasis. Dum tiu periodo Oomoto ricevis subpremecon de japana registaro antaŭ la dua mondomilito, la plej kruelan en historio moderna en Japanio. Inkluzive la Majstron Deguĉi Onisaburo, ĉiuj kredantoj estis persekutitaj kaj pasigis longan tempodaŭron, malfacilan kaj netolereman.

Ĉe sankta ĉefurbo Brazilio, kiu estis fondita laŭ Dia revelacio, hodiaŭ Oomoto Internacia fondiĝis. Tio konsistas en la profunda Dia plano, mi kredas. En Sud-Ameriko, Brazilo, Sud-Amerika Centro de Oomoto troviĝas en Jandira, proksima de Sao-Paŭlo. Ĉifoja elpaŝo de Oomoto en Brazilion estas la unuafoja en la historio de Oomoto. Ni ne povas agadi sen varma subteno kaj kunlaboro de ĉiuj, kiuj hodiaŭ kolektiĝas. Ankaŭ poste mi petegas grandan helpon.

Mi petas, ke vi pasigos trankvile kaj ĝoje hodiaŭ vespere, parolante kaj vidante la prezentaĵojn de japana kulturo, kiun ni japanoj kore traktas. Kaj ĉe la komenco de prezento de kulturo ni unuafoje prezentos videon nomatan "Utafesto—Belo de la ĉielula regno—festo por la mondopaco." Krome en la fino de ĉi tiu kunveno ni prezentos alian videon nomatan "Historio de Oomoto" por prezenti paŝon de Oomoto ekde la fondiĝo.

Do, mi finas mian saluton, kiel reprezentanto de Oomoto-Centro kaj de ĉirkaŭ 100 karavananoj, kiuj ĉifoje vizitis el Japanujo. Koran dankon.

La 3an de decembro, 2004

Kunihiko Ŝimamoto, ĉefdirektoro de Oomoto

japanajn tradiciajn artojn: muziko de Jakumokotoo; dancoj de noaj dramoj kun ĉantado kaj muziko, budoo, teceremonio, ĵonglado kaj kantoj de Oomoto. Dum la prezentado, samtempe oni regalis la gastojn per bovloj da verda teo. Post la prezentado salutis s-ro Pedro Jacintho Cavalheiro, la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, kaj en la fino de la festeno s-ro Maeda, la direktoro de "Oomoto Internacia" esprimis dankemon por la ĉeesto en Portugala lingvo.

## Komuna Preĝo

Komuna preĝo por mondopaco okazis matene en la 4a de decembro en Instituto Teosófico de Brasília kiu troviĝas en la urbo Brasília, la satelita urbo de Brazilio. Spirita Gvidantino, membroj de karavano, esperantistoj kaj reprezentantoj de spiritistoj kaj religiaj grupoj kune preĝis por la mondopaco. Oni preĝis en la stilo de Oomoto diservo: purigado, ofero de legomoj kaj fruktoj, ofero de teceremonio fare de Spirita Gvidantino, recitado de preĝvortoj, ofero de pinbranĉetoj, recitado de Amacu Norito. Dum la ofero de pinbranĉetoj, la reprezentantoj de spiritistoj kaj religiaj grupoj voĉe aŭ silente oferis respektivajn preĝojn. La reprezentantoj estis jenaj: Giridhari Das (Hare Krishna), Suzel Saraceni (Universitato de Paco), Siegfried Elsner (Hinduismo), Eduardo Weaver (Teozofio), Ursula Grattapaglia (Spiritismo), Josue Borges (Evangeliiismo), Nildo Nascimento (Religia Unuiĝo) kaj Joao Nioto (framasonoj).

Post la diservo s-ro Ŝimamoto, la ĉefdirektoro de Oomoto-Centro, kaj D-ro Ulisses Riedel de Resende, la prezidanto de Instituto Teosófico de Brasília kaj Brazila eksparlamentano, salutis al la preĝantaro kaj dankis ilian ĉeeston. En la fino Oomotanoj kantis la Fundamentan Misian Kanton. Ĉiuj preĝantoj fotis la memorfoton, kaj ĉiuj kune prenis la tagmanĝon. Post la tagmanĝo, Spirita Gvidantino kaj Oomotana karavano veturis al la aerhaveno de Brazilio kaj flugis al Sao-Paŭlo.





## Saluto de Ĉefdirektoro de Oomoto

Ĉi tie en altebenaĵo proksima de la sankta ĉefurbo Brazilio de Brazilo, kiun ni faris celebrejo, en la descendo de la Mastra Dio, kiu kreis grandan universon, ni okazigis serene supersektan "komunan preĝon deziri mondopacon." Mi elkore dankas vin kun ĝojo.

Hieraŭ vespere "gratulkunveno memore de la fondo de Oomoto Internacia" en la hotelo Blue Tree Park, kiu troviĝas en la kapparto de jetforma urbo Brazilio, kien gravaj politikistoj el la diversaj landoj en la mondo multe vizitas, okazis impone, invitinte multajn gastojn el ĉiuj rondoj.

Pasiginte nokton, hodiaŭ ĉi tie en pura sanktejo kune kun vi ĉiuj, mi dediĉis puran preĝon. Mi tre ĝojas.

Mi mem vizitis tiun lokon ankaŭ antaŭ tri monatoj. Kompare kun tiu sezono, ĉio pliverdiĝis, kaj ĉirkaŭa spaco fariĝis pli freŝa kiel puriginta mian koron, kaj mi sentas novan kortuŝon.

La Mastra Dio nur esperas, ke ĉiuj homoj estu gefratoj kaj ili vivu harmonie trankvile kaj feliĉe. Sed homaro, kiu agis kontraŭ la granda koro de la Mastra Dio, estis orgojla, kaj kun egoisma kaj fortulovenkisma koro, eraris malignan vojon. Pro tio, eventoj dolorplenaj ripetiĝas kaj multe da respektindaj homaj vivoj perdiĝas en multaj lokoj en la mondo malgraŭ antikva aŭ nuntempa, orienta aŭ okcidenta. Mi vere malĝojegas.

Ni elkore preĝas, ke venos paca mondo sen milito, malsato, malriĉeco kaj krome malsano, kiel la Mastra Dio imagas, forigante obstaklojn formajn kaj senformajn kiuj venas de la diferenco de regnoj kaj nacioj, idealo, kulturo kaj religio. Alie, mi deziras, ke ni klopodu realigi mondopacon, mano kun mano, kunlabore kun ĉiuj kiuj kunvenis en ĉi tiu sanktejo hodiaŭ.


Esperante, ke memorinda tago, hodiaŭ, la kvara de decembro en 2004 fariĝu memorinda ankaŭ por ĉiu homaro, mi finas mian saluton kiel reprezentulo de Oomoto.

Elkore mi dankas vin.

La 4an de decembro, 2004

Komuna preĝo deziri mondopacon

Kunihiko Ŝimamoto, ĉefdirektoro de Oomoto



## Granda Festo de 80jara jubileo

Sudamerika Centro de Oomoto situas en la urbo Jandira, 40 kilometrojn okcidente de Sao-Paŭlo. Tie oni konstruis la unuan preĝejon Aizendô en 1957, kaj en tiu ĉi jaro, por celebri la 80jaran jubileon de la Oomoto-misiado en Brazilo, oni konstruis la novan preĝejon kaj nomis ĝin ankaŭ Aizendô.

La 5an de decembro matene en la nova preĝejo Aizendô, Spirita Gvidantino, membroj de karavano kaj la Oomotanoj en Brazilo solenis la Grandan Feston de la 80jara jubileo de Oomoto-misiado en Brazilo, kaj la ceremonion de finkonstruo de la nova preĝejo. Oni havis honoron vidi inter ĉeestantoj la urbestron de Jandira, s-ron Paulo Henrique Barjud.

En tiu Festo oni recitis la preĝvortojn en Portugala lingvo. Dr. Benedicto Silva, membro de Oomoto, tradukis ĝin por tiu ĉi jubileo. Multaj Oomotanoj en Brazilo estas tria aŭ kvara generacio de japanaj enmigrintoj kaj ili ne bone komprenas japanan lingvon. Tial ili estas tre feliĉaj kun la nova traduko de preĝvortoj al sia patrina lingvo. Ankaŭ Spirita Gvidantino kaj membroj de karavano kune recitis la proĝvortojn en Portugala lingvo.

Post la Granda Festo, oni celebris la ceremonion por konsoli la spiritojn de ĉiuj viktimoj de kataklismoj kaj militoj tra la mondo kaj ankaŭ konsoli la spiritojn de la prapatroj kaj forpasintaj familianoj de Oomotanoj en Brazilo.

Post la fino de ambaŭ ritoj, Spirita Gvidantino salutis al la ĉeestantoj kaj poste oni honoris la meritulojn, kiuj klopodis por la misiado de Oomoto en Brazilo. Speciale, membroj de la familioj Ojama kaj Kondo, kies antaŭuloj multe penis en la frua periodo de Oomoto-misiado en Brazilo, ricevis la dankleterojn.

La 87 membroj de karavano vojaĝis al la urbo Santos kaj akvofalo de Iguazú kaj revenis al Japanio en la 11a de decembro. Spirita Gvidantino kaj ŝiaj akompanantoj restis en Brazilo ĝis la 19a de decembro, ŝia grupo vizitis lokajn filiojn de Oomoto kaj la infanan lernejon Bona Espero.

## Bona Espero

Spirita Gvidantino kaj ŝiaj akompanantoj vizitis la bieno-lernejon por malfavorataj infanoj "Bona Espero" en la urbo Alto Paraíso, 250 kilometrojn norde de Brazilo en la 15a de decembro. Ilian alvenon varme bonvenigis gestoj Grattapaglia, la administrantoj de la lernejo kiuj multe klopodis por la malfermo de "Oomoto Internacia", kaj lernejoj stabanoj kaj 30 infanoj.

En la vespero je la 8a ptm. infanoj kaj instruistino kantis kaj dancis por gratuli la naskiĝtagon de Spirita Gvidantino kaj la kreinto de internacia lingvo, Dr. Zamenhof. Ili ankaŭ prezentis teatran ludon "Vendistino de revo," kaj faris japanan teceremonion por prezenti bovlojn da verda teo al Spirita Gvidantino kaj aliaj gastoj. Rotarianoj en Alto Paraíso kaj esperantistoj ankaŭ ĉeestis en la evento. Post la teceremonio, oni servis vespermanĝon en la klasĉambro — ĉiu frandaĵo estis kuirita de la infanoj kaj stabanoj mem, kaj ĉiu dekoracio ankaŭ estis mem farita. Tiel ili festis la naskiĝtagon de Spirita Gvidantino modeste tamen varme kaj amplene. Spirita Gvidantino esprimis sian grandan dankemon por tiu amplena festo, ŝi diris ke tiu ĉi festo estis la plej rava kaj neforgesebla el ĉiuj siaj naskiĝfestoj en sia vivo, kaj ŝi donacis memfalditajn paperpavojn kaj aliajn donacojn al ĉiuj infanoj. La geknaboj multe ĝojis kun la donaco, kaj interesiĝis pri la paperpavo kaj petis al ŝi ke ŝi montru al ili kiel faldi la paperon. Ŝi ĝoje instruis la paperfaldon al ili ĝis la fino de la festeno en malfrua vespero.

En Bona Espero, oni kolektiĝas en la mateno kaj vespero ĉirkaŭ la Paca Monumento en la ĝardeno kaj oferas preĝojn. Ili petis al Spirita Gvidantino oferi preĝon en la sekvanta mateno, kaj ŝi recitis la preĝvortojn Amacu Norito, ankaŭ aliaj ĉeestantoj oferis preĝojn. Post la matenmanĝo, Spirita Gvidantino kaj ŝiaj akompanantoj ekveturis al Brazilio. Ĉiuj venis por adiaŭi al la grupo de Spirita Gvidantino, kaj multaj el la infanoj bedaŭris la adiaŭon kun larmo.

La grupo de Spirita Gvidantino revizitis la Oomoto-Sudamerikan Centron en Jandira, Sao-Paŭlo, kaj revenis senakcidente al Japanio en la 20a de decembro.

# Demandoj kaj respondoj

## pri Oomoto

Tiu ĉi serio estas la klarigo de la instruo de Oomoto en la formo de demandoj kaj respondoj. Ni redaktis tiujn tekstojn por Oomotanoj por ilia kleriĝo, kaj ni supozas ke tiuj estas interesaj ankaŭ por la legantoj de nia revuo. Tial ni publikigas tiun serion en kelkaj numeroj.

### 1. Kial necesas religio?

Oni emas forgesi la ekziston de religio, same kiel oni facile forgesas, ke propra vivo nun daŭre ekzistas. Dum vi ne konscias, reale via vivo ekzistas. Tutsame Dio ekzistas kaj ĉiam Dio gardas nin dum nia nekonscio. Kompreni tiun ĉi fakton kaj kredi veran Dion ja estas la kialo de religia ekzisto. La instruo montras, ke la vera religio estas jen lumo, jen vivo, jen granda motoro por homa vivaktiveco.

Religio havas povon idealigi, purigi kaj paradizigi ĉiujn homajn aferojn, kaj ĝi ankaŭ povas plibonigi kaj plitrankviligi iun personon, iun familion, iun nacion kaj la tutan mondon. Per ĝi oni unuafoje povas akiri vere ekvilibrajn koron kaj vivadon.

Kial religio estas necesa, se dirite realisme, estas tial ke kredo je Dio portas al homo fortan kaj sanan korpon kaj dekateniĝon de kora sufero, al familio disvolviĝon, al la mondo prosperon kaj cetere al ties ĉiuj flankoj pliboniĝon.

### 2. Mi pensas ke aliĝi al religio estas eskapi de vivo. Ĉu ne?

Post la aliĝo al religio, tiu homo, kvankam nevidebla per la okuloj, povas eniri en la vivdaŭron gardatan de granda forto de Dio. Sekve tiu ĉiam emas kun bonvolemo rigardi aliajn kaj socian staton. Tial, ŝajnas, tiu estas, en la okuloj de senreligiuloj, ia eksterulo de homa socio, kaj lasus iluzion eskapi el la severa homa socio. Sed la religio esence estas la origina forto de la homviva aktivado, la vivo mem, kaj ĝi idealigas, purigas, ĉion en la homa socio kaj plie evoluigas la individuon, hejmon, landon kaj la tutan mondon, pro kio la mondo paciĝos. La religio ja estas la forto prosperigi ĉion. Do, por la homo aliĝi al religio neniam signifas eskapi el la vivdaŭro sed tute male ricevi pli da aktiveco kaj evoluigo.

### 3. Ĉu la religio, kiu celas kuracadon kaj mongajnon, ne povas nomi sin religio?

Estas multaj religioj kiuj prosperas per kuracado de malsanoj kaj

tiusimilaj organizoj kiuj per allogaj sloganoj de mongajno kaj, utiligante homan ĉagrenon, kredantigas multajn homojn. Estas pli multaj, ol kiom oni supozas, tiaj religisimilaj organizoj kun celo nur por mongajno kaj perdigas al la homoj ĝustan vojon. Sed, ni ne povas aserti ke la resanigo kaj mongajno tute ne koncernas la religion. Ĉar la religio estas origina forto de la feliĉo kiun ĝi alportas al la homoj. Estas tute nature ke post la aliĝo al religio ili ĉiam kun ĝojo kaj kuraĝo pasigas la vivadon, kaj tial povos okazi, kiel konsekvence, ke la resaniĝo povas esti la kaŭzo de la aliĝo al la religio kaj la aliĝintoj gajnos pli da konfido de la aliaj, kio ebligus al tiu gajni monon.

Sed tamen tio okazis kiel nur natura konkludo. Ni povas diri ke la religioj, kvankam ĝi nomas sin religio, kiuj celas nur resanigon kaj mongajnon, estas malaltrangaj religioj. La religioj donas la lumon al la homa vivdaŭro kaj celas la mondpacon, surbaze de siaj esencaj misioj, donas al la homoj belan koron bonvenigitan de Dio. Kaj per siaj instruoj la religioj devas gvidi kiel la politiko, ekonomio, kulturo kaj eduko. Kaj ili devas kontribui por vaste ĉielregni la surteran mondon. Ni devas scii: kvankam estas multaj religioj, tamen ili multe malsamas en siaj enhavoj. Do, ni devas kun prudento aliĝi al la vera religio.

### 4. Pro homa malforteco naskiĝis la religioj. Ĉu ne?

La esencaj principoj de religioj estas kredi kaj adori Ekzistantan Superan Iun, kiel Dion aŭ Budhon. Kvankam iuj diras ke la malforteco de la homoj sin

turnas al religioj, pli ĝuste dirite, estas ne pro menciita kaŭzo sed denaŝka natura karaktero (inklino al religio) de la homo.

Kiam al la homoj la vivo estas minacita de krizo de la vivo, ĉiuj sin turnas kaj sin apogas al Ekzistanta Iu Supera. Kaj kiam la homo vidas la belecon de granda naturo, li sentas sian koron kvazaŭ refreŝigita, tio estas ankaŭ ia korinklino al religio. La religio ekestiĝis per si mem, postulate de la homeco. Kaj ne pro la malforteco de apartaj homoj naskiĝis la religio, sed ni povas diri ke la religio naskiĝis, ĉar la homeco de ĉiuj homoj postulis ĝin.

### 5. Kian profiton oni povos ricevi post la aliĝo al Oomoto?

Ni opinias ke ne estas rekomendinde oomotaniĝi nur por profito, sed tia demando povus esti prava de la vidpunktoj de la triapersonoj. Post la oomotaniĝo nur tiu homo per sia propra travivado kun Oomoto-kredo povos percepti "kio estas la profito." Ni tamen prezentas laŭvice kelkajn ekzemplojn kiuj povus esti utilaj por via antaŭkono.

1. Oni povas fari preĝon al Kreinto de ĉio en la universo kaj povas labori rekte por Dia Laboro kiel manoj kaj piedoj de Dio. Dia Laboro signifas reordigi la nuntempan malordigitan mondon kaj savlaborojn por ĉio, ne nur por ĉiuj homoj en la mondo sed ankaŭ ĉiuj bestoj kaj plantaĵoj.

2. La instruoj de Oomoto ampleksas en ĉio pri [la materia mondo] (perokule videbla) kaj [la spirita mondo] (perokule nevidebla, anima), interrilatoj inter Dio kaj





la homo, inter Dio kaj ĉiuj estaĵoj, koncerne de ĉio, kio ja estas vaste, profunde kaj detale instruata. Pro tio ni povas percepti ĉion de la prudenta rigardo kaj fari ĝustan decidon. Kaj ni povas havi senŝanceliĝan ŝtalan volon kaj la absolutan trankvilecon, apogante ĉion al Dio.

3. Oomoto montras evidente la bildon de la ideala mondo. Sekve ni povas havi klaran konvinkiĝon pri la celo de la vivdaŭro por kio la homo vivas.

4. Oomoto precize instruas laŭprocezan altiĝon de homa spirito (animo) kaj laŭ la strebado oni povas supreniri en pli altan gradon.

5. Koro kaj korpo ambaŭ fariĝas sanaj, la hejmon regas paco. Prosperas entrepreno. Pli grandiĝas la socia konfido kaj ni pozitive volontule servolaboras por la publiko. Tiel do, sinsekve ni povas ricevi, per si mem, bonan reputacion, socian postenon, longan vivon kaj ekonomian riĉon.

6. La homo vivas ne nur en fizika mondo sed ankaŭ postvivas post la morto en ĉielregno (kie veraj dioj kaj ĉieluloj loĝas kaj ĉiuj estaĵoj vivplene prosperas en pura, varma kaj luma mondo). Kaj li poreterne kiel ĉielulo povas servlabori en Dia Laboro, kiu progresigas, evoluigas kaj plialtigas ĉion.

Sed por tio, kompreneble, jam ne necesas diri ke ĉiu homo devas strebi, preĝante kaj observante instruojn de Dio.

### **6. Kio estas Dio? Ĉu ĝi estas elpenaĵo de homo, per kiu la homo konsolas sin mem?**

Dio ne estas materialo same kiel nia koro. Ĝi ne estas videbla per homaj okuloj, nek tuŝebla per homaj manoj. Tial povus okazi ke la homo pensas ke Dio estas homa elpenaĵo al kiu li sentigas dankemon nur por sin mem konsoli. Kvankam tiel nomataj koro kaj vivo, ili estas ankaŭ nek videblaj nek tuŝeblaj, tamen ni povas percepti ke ili certe ekzistas. Kiel ekzemple, amo, intelekto, volo (voli ion) ne estas videbla, sed neniu povas nei ĝian ekziston.

Ĉi tia ne-materia ekzisto estas nomata vastasence spirito, spiritaĵo, kiuj restas en ĉio ekzistanta en la universo. Kaj la vivforton de ne-videbla funkcio, la originon de ĉio, ni nomas Dio, kaj ties Spiriton ricevas la tuta kosmo (ĉiuj astroj, la terglobo, sur kiu ekzistas ĉiuj montoj, maroj, riveroj, homoj, bestoj, plantaĵoj kaj eĉ mineraloj).

Samtempe, la tuta estaĵo en la universo estas la manifestiĝo de la vivforto, kiu estas rigardata kiel la Peceto

de Dio. La funkcio de volo kaj intelekto tute ne estas produktaĵo, kiun la homo mem faris, sed ilin oni posedas denaske. Tiel same, la origina fonto de la universo tute ne estas produktaĵo de la homo mem, kaj tio neniam estas tiel malgranda ekzisto, per kiu la homo sin konsolas.

### **7. Se Dio ekzistas, kial Li ne montras sin aŭ konigas sian ekziston al ni?**

Iuj urĝe diras: "Se Dio ekzistas, kial Li ne montras sian ekziston en facile konvinka maniero? Se Dio estas ĉiopova, kial Li ne montras sin per sia frapo al nia kapo aŭ tirante nian orelon?" Ili asertus prave. Ilia urĝeco venas de la fakto ke ili ne povas senti Dion.

Dio estas nevidebla ekzisto, tial ni ne povas vidi Lin rekte. Sed kiam ni trarigardas ĉirkaŭaĵon kun kvieta koro, ni trovas la prezentiĝon de Dio. Ekzemple, la moviĝo de nuboj aŭ belaj floroj estas manifestiĝo de Dia koro. Ĉio en la granda universo ja estas aktivado kaj figuro de Dio.

Bedaŭrinde, tiuj estas malmultaj, kiuj sentas Dion, kvankam ni ĉiuj estas permesataj vivi en la sino de Dio. Ni ne povas vidi homojn aŭ aferojn en la mallumo, tamen sub la luma elektra


lampe ni povas vidi ilin klare. La lumo de Dio estas kvazaŭ la elektra lampo. Ĝi ĉiam brilas lume. Ĉu vi ne pensas, ke preskaŭ ĉiuj homoj plendas, "kie ekzistas Dio?", vidante alian direkton kaj ne vidante la lumon?

Ni devas peni kvietigi, purigi kaj plibonigi nian koro. Ni povas posedi sperton reale senti la ekziston de Dio, konkrete dirite, vizitante sanktajn lokojn en Ajabe kaj Kameoka kun Dia atmosfero, legante sanktajn, revelaciajn librojn de Oomoto aŭ turnante sian koro al Dio per plurfojaj recitadoj de preĝvortoj.

### **8. Kia estas Dio laŭ la instruo de Oomoto?**

La difino de Dio en Oomoto estas: Dio estas ekzisto, kiu kreis la universon, nutras kaj gvidas homaron. Kiam ni rigardas floron en la ĝardeno kun atento, ni povas kompreni Dion. Kiu ja kreis ĉi tiun floron kun belaj koloroj kajodoro? Se semoj semataj en la sama tero diferencas, ekfloras floroj diverskoloraj tie. Kiu faras tion? Flor-prizorganto nur prizorgas florojn.

Oni diras: aferoj iras glate kaj nature. Kion la vorto "nature" signifas? Ĉiuokaze, ni ne povas ne kredi naturan



grandan ekziston. Ni nomas forton naturan kaj originalan "Dio".

### 9. Kia estas Dio kiun Oomoto kultas?

En Oomoto, ni adoras Dion, la kreinton de la universo kaj diversajn justajn diojn. Dio, la kreinto de la universo, estas eterna, absoluta, reale ekzistanta Dio. En "Koziki", kroniko pri malnovaj okazaĵoj, ĉi tiu Dio estas nomata "Amenominakanuŝi-no-ookami". En Oomoto, ĉi tiu Dio estas nomata, "Oomoto-sume-oomikami".

Diversaj religioj en la mondo nomas la originalan Dion "Javeo", "Ĉielo" aŭ "Bramo".

En Oomoto, ni kultas ne nur la Kreinton de la universo, sed ankaŭ anĝelojn fidelajn laŭ la ordono de Kreinto. Prapatroj de ĉiuj familioj ankaŭ estas bone kultataj.

### 10. En kia maniero ni povas kredi la ekziston de Dio?

Dio estas spirita ekzisto, tial ni ne povas vidi per niaj okuloj. Sed ni povas senti Dion. Ekzemple, ni povas iel senti kiel nia najbaro pensas, se ni tenas trankvilan koron en nia ĉiutaga vivo.

Same kiel tio, ni nepre povas senti la ekziston de Dio se ni arde sopiras al Dio.

Ĉar Dio estas absoluta ekzisto, ni ne povas kredi Dion eĉ se ni penadas analizi per nia relativa homa saĝo. La teorio aŭ esplorado nur kondukas nin al abstrakta ideo, ne al firma Dikredo. Ni povas kredi Dion nur tiam firme, kiam ni penadas senti Dion per nia tuta korpo. Ĉar la arda koro estas kunligita kun Dio per transcenda forto.

Dio ne estas maŝino nek malvarma leĝo, sed estas ekzisto kun varma, vivanta, profunda amo. Kiam ni serioze preĝas, Dio donas al ni motivon senti Dion. Por kredi Dion profunde, restas nenia rimedo krom preĝi al Dio kaj akumuli spertojn.

Tamen, profunda Dikredo neniam koincidas kun perfekta kompreniĝo de grandioza Dio.

### 11. Kial ni ne deziras preĝi al Dio?

Se ni ne havas koron sopiri al Dio, ni ne havas deziron preĝi al Dio. Ju pli arda estas la sopiro al Dio, des pli forta estas deziro preĝi al Dio. Tial ju pli malarda sopiro al Dio, des pli malforta deziro preĝi al Dio.

Antaŭ ĉio, kutimo de kulto mem estas grava. Kulto estas fundamento de Dikredo kaj la vojo kondukas al Dio. Eĉ se la kulto en la komenco estas farita formale, la preĝo fariĝos iom post iom arda preĝo. Ĉar ni kun sopiro al Dio povas komunikiĝi kun Dio.

Iuj hontas pri preĝo. Preĝo estas ne nur peto al Dio sed ankaŭ estas la vojo al senlima progreso, harmoniigo kun Dio kaj kompreniĝo de senlima Dia koro. Do bonvole komencu je preĝo.

### 12. Kion preĝi al Dio?

Ĝenerale, oni emas preĝi al Dio kun petego ke ili gajnu profiton en komercado aŭ Dio favoru ilin. Tia preĝo estas egoisma preĝo aŭ postulo kaj ĝi ne estas justa preĝo.

Justa preĝo estas peti Dian protekton konfidante ĉion al Dio, "Bonvolu gvidi kaj protekti min laŭ via volo." Samtempe grava estas penado kaj praktiko por plibonigi sin mem. Serioza penado certe alportos al vi Dian protekton.

Estas bone ke vi preĝu por vi mem sed ne forgesu ke vi preĝu por mondopaco aŭ feliĉo de homaro.

Ĉu ni ne preĝu serioze ke Dio donu trankvilon, feliĉon al ĉiu homo sur la tero kaj mondopaco? Kaj ni agadu por la realiĝo de paco kaj preĝo en nia ĉiutaga vivo.

Fondintino Nao Deguĉi surverŝis akvon sur sin por purigado eĉ nokte en severa vintro. Spite de la granda aĝo, ŝi faris purigadon dekojn da fojoj en unu nokto. Ŝi petis pardonon de Dio pri peko, malpuro kaj impertinento en la mondo anstataŭ homaro. Ŝi preĝadis Dion ke granda malfeliĉo fariĝu eta malfeliĉo, eta malfeliĉo fariĝu nenia.

Ĉu ni preĝu por mondopaco kaj feliĉo de homaro kun vasta koro?

### 13. Ĉu homo kun bona konduto bezonas havi dikredon?

En la mondo troviĝas multaj justaĵoj kaj bonaĵoj. Sed nenio estas pli justa ol sekvi Dion kiu kreis ĉi tiun mondon kun humila koro.

Eĉ se unu peco da dentorado en la horloĝo turniĝas per la tuta forto, ĝi per si mem ne kontribuas al la horloĝo. Ĉar turniĝado de dentorado harmoniiga kun aliaj aparatoj por atingi tutan celon estas justa laboro en la horloĝo. La samo estas dirita pri homa afero. Eĉ se ni agas kun la





konvinko ke ni iras la justan vojon, ĉu nia vojo estas vere justa aŭ ne estas super homa kompreno.

La mondo de Dikredo havas sian propran instruon montritan de Dio kaj ĝi montras al ni la vojon sur kiu ni devas iri. La vojo kondukas nin en la sekura, justa kaj korekta direkto.

Eĉ se vi pensas ke vi kondutas bone, estas malfacile fari agadon kiu harmonias Dian koron. Por fari tion, vi unue faru sinceran penadon kiel homo. La penado gvidos vin al Dikredo aŭ preĝo al Dio. Se vi deziras kondukti bone elkore, bonvole lernu la veran servon al Dio kaj iru universalan kaj eternan Dian vojon.

#### 14. Per kia kriterio ni elektu religion?

La plej grava afero en la elekto de religio estas ĉu ni povas havi fortan simpation en sia animo al la religio. Sed ni devas esti atentema al la enhavo de religio. Ĉar iuj religioj apartenas al malalte-nivela superstiĉo kaj aliaj adoras malalte-nivelan spiriton kiel animala-spiriton.

Ni rekomendas al vi ekzameni jenajn 3 punktojn pri la religio.

1. Ĉu ĝi adoras la Kreinton de la universo?
2. Ĉu ĝi havas profundan instruon kun

aŭtoritato kaj ĝi promesas al vi senliman progreson?

3. Ĉu ĝi havas eminentajn gvidantojn (fondinto, gvidanto, misiistoj)?

Kompreneble aliaj elementoj ankaŭ estas gravaj. Temas pri Oomoto: Ĝi havas eksterordinare eminentajn aferojn pri la 3 punktoj kompare kun aliaj religioj. Plie, Dia protekto estas abunda kaj plenplena de divirtoj. Oomoto aperis por savi la tutan mondon. Tial se vi fariĝas Oomotano, vi povas partopreni en Dia Granda Entrepreno kiel fidela servanto.

#### 15. Malgraŭ tio, ke mi kredas, kial malfeliĉo venas al mi?

En la komenco de religia vivo, oni emas pensi, ke nur feliĉo venas, sed la realo iras ne ĉiam tiel. Oni fojfoje renkontas jen malsaniĝon jen malfeliĉan katastrofon.

En niaj ĉiutagaj vivoj multaj estas homaj agadoj neraciaj aŭ eraraj, kaj ankaŭ aferoj komplike rilataj al malamo kaj malpaco inter homoj. Pri tiuj ĉi oni povas diri, ke homoj inter si aŭ si mem kreas semon de malfeliĉo, ĉu ne?

Pri tiu ĉi problemo respondecas homo. Dio estas estaĵo de nur amo, nur

bono. Dio neniam malamas aŭ punas iun ajn. Dio ŝanĝas malbonan rezulton memfaritan de homoj kiel eble plej malgranda. Okaziĝo de malfeliĉo neniam venas de Dio aŭ de kredado.

Se oni pasigas vivojn kun ĝustigitaj koro kaj aktiveco, malmultiĝas tiaj malfeliĉoj. Havi la koron kredeman portas eblecon tiel pensi eĉ ĉe renkonto de malfeliĉo, "Mi povus renkonti pli grandan malfeliĉon, sed dank'al Dio granda malfeliĉo estis ŝanĝita malpli!", kaj ni povas male senti dankemon al Dio. Ju pli multe ni konscias la celon de naskiĝo al tiu ĉi mondo, des pli bone vi povas ne venkete de malfeliĉoj pasigi ĉiutagajn vivojn kiel helajn kaj aktivajn.

#### 16. Iu ajn religio ofte mencias fatalon, nome, kio estas tio?

Kie okazas io, tie nepre estas ia kaŭzo. Oni nomas tiun kaŭza fatalo.


En la mondo hodiaŭa oni povas foje trovi la staton tia, ke bona ago ricevas neniom da rekompenco, aŭ ke estas ne punate fari malbonaĵon kaj daŭre ĝin kaŝi. Sed Dio en ĉiuj okazoj vidscias ĉion. Eĉ se iu ne estas leĝe punata, la rekompenco por malbonfaraĵo revenas al tiu aganto kun iu aliforma puno. Se iu

daŭre faras bonajn agojn, nepre tiu ricevas favoron de Dio kaj feliĉiĝas.

Dio vidas ĉion juste. Kiam oni faras bonajn agojn, tiam nepre pli da bono sinsekvas. Kiam oni faras malbonajn agojn, tiam malbono aliforme revenas al tiu aganto. Tio estas nur sinsekvo de la kaŭzo, ne de tio, ke Dio punas, sed de tio, kion oni faris.

#### 17. Ĉu malsano resaniĝas per kredado?

Malsano havas kelkajn kaŭzojn. Malgraŭ tio, ke vi kredas Dion, se vi faras senritman vivadon aŭ prenas ion venenan al via korpo, vi ne povas eviti malsaniĝon. Se okazas tiel malsaniĝi, vi pardonpetu Dion pri via pasinta vivmaniero, kaj samtempe gravas, ke vi ricevu Dian favoron pere de kuracistoj kaj medikamentoj, kiuj nepre necesas por resaniĝo en la reala mondo; nur preĝi al Dio aŭ ricevi nur "Miteŝiro Otoricugi", la resaniga petpreĝado de Oomoto, kun neniom da ordinara kuracado portas rezulton tiel, ke resaniĝiva malsano estas neniam resaniĝiva. Tamen gravas, ke preĝu al Dio por pli bone ricevi Dian favoron pere de kuracistoj kaj medikamentoj.



Aliflanke, mensa malfortiĝo multfoje kaŭzas malsaniĝon. Se okazas tiel, vi pli ol kutime preĝu al Dio, kaj vi koncentriĝu je kredado. Pere de tiuj agoj via animo plifortiĝas, ĝistiam malhela koro fariĝas pli kaj pli hela, kaj ankaŭ via korpo pli kaj pli resaniĝas. Kaj, se vi suferas pro mensa malsano, mi rekomendas vin ke preĝu por Difavoro, farante "Gokigan", la preĝon fare de peranto, aŭ "Miteŝiro Otoricugi", kaj samtempe konsultiĝu kun psikopatologia kuracisto kaj ricevu lian kuracadon.

### **18. Estas iu religio, kiu diras, "Kuracisto kaj medikamento estu for, por vi sufiĉas nur preĝo." Kiel Oomoto pensas pri tio?**

Ĉar homo havas korpon, foje okazas malsano. Kiam oni malsaniĝas, tiam oni devas fidi kuraciston kaj medikamenton. Por tio, en tiu ĉi mondo, Dio permesas estadon de kuracistoj kaj medicino. Sed ne estas komplete nur porti vian korpon al kuracisto en la okazo de malsaniĝo. Antaŭ ĉio gravas, ke vi preĝu turnante vian koron al Dio kaj elkore petu Dian helpon.

En la instruoj de Oomoto estas utao jena:

Eĉ se preĝas vi  
Malsaniĝinte en lit'  
dion respondan  
vi ne forgesu nepre  
kuraciston realmondan.

La utao instruas nin, ke samtempe necesas ambaŭ sincera preĝo al Dio kaj uzo de kuracisto kaj medikamento. Estas religioj, kiuj ekskludas ĉiajn rimedojn kiel eĉ medikamenton kun devianta kredo. Kaj estas homoj, kiuj fidis nur kuraciston, nur medikamenton kaj forgesas fidon al Dio, la origino de vivo. Ĉi tiuj ambaŭ estas malbonaj.

### **19. Religia vivo. Kia vivo ĝi estas?**

Se temas pri religia vivo, oni povas havi impreson, ke ĝi estas vivo tia, malsimila al tiu de la ordinaraj homoj, sed reale ĝi ne estas tiel neordinara vivo. Ĝi estas tia, ke oni tagon post tago preĝas al Dio kaj vivas laŭ la koro de Dio. Diri tiel estas facile, sed agi tiel povas esti plej malfacile.

Kredi kaj preĝi Dion estas origino de religia vivo. Oni devas komenci la vivon ekde ĉi tio. Samtempe estas grave, ke legante la sanktajn librojn

vi konu instruojn de Dio. Farante tiel oni rimarkas gravecon, kiun montras la preĝvortoj kaj la sanktaj libroj. Kaj ekfontiĝas la koro tia, ke ĉiutaga vivo pli konforma al la instruo estu ŝanĝita. Konkrete realigi la korvolon povas fari ĉiutagajn vivojn kontentigaj al Dia koro, kaj vi paŝon post paŝo povas altniveligi en religia vivo.

Sperto estas bezonata al religia vivo. Se vi agas kun sincera preĝo, vi nepre ricevos Dian protekton kaj vi povas gajni religian sperton. Kaj la sperto povas igi vin kompreni ĝis la fundo de via korpo amon de Dio kaj grandecon de Dia forto.

Religia vivo estas tio, ke oni ĉiutage preĝas al Dio, kaj oni lernas la instruojn, kiujn oni aplike devas praktiki en ĉiutagaj vivoj.

### **20. Kio estas la plej grava en religia vivo?**

En la lasta rubriko mi respondis, ke religia vivo estas la vivo tia, ke oni preĝas al Dio kaj oni praktikas la instruojn de Dio. Oferado de dankemo kaj preĝo al Dio kaj praktikado de Dia instruo estas kvazaŭ ambaŭ radoj de ĉaro. La plej grava el ili estas serioza preĝo al vera Dio.

En la instruoj de Oomoto montriĝas jene, "Nenia trezoro estas pli valora ol preĝo." Preĝo estas granda origino de religia vivo. Kie mankas preĝo, tie mankas vera protekto de Dio, neniam ekaperas la vero. Se vi preĝas, vian koron lumas la lumo, kaj viaj imagoj pri aferoj pli klariĝas. Vi ekpovas vidi la vojon, kiun vi devas iri. Eĉ pli, elaperas deziro marŝi pli antaŭen, ekaperas la forto toleri kontraŭ malfacilaĵo kaj transpasi ĝin. Ankaŭ la koro retrospekta plifortiĝas, kaj en vi ardas deziro al senlima plibonigo.


Preĝo estas fonto de ĉiuj vivofortoj. Se unufoje vi enpaŝas la vojon de religia vivo, estas grave, ke vi praktiku preĝojn en ĉiu mateno kaj vespero. Al mi ŝajnas, ke vi en tiuj preĝoj povas mem senti valorecon de preĝado.

### **21. Kio ja estas iluminigi?**

En religioj oni ofte diras pri iluminigi. Ĝi estas religia termino, uzata nun vaste ĝenerale, sed origine de Budhismo.

Ni en ĉiuj tagoj vivas rilate al diversaj aferoj; kutimo, mono, honoro, rango kaj ideo, ktp. Kaj ni vivas regate de tiuj aferoj. Eĉ se iu ĉiam diras, "Mi pensas kaj agas sendepende de io," kiam iu afero





volvas tiun homon ĉirkaŭ ties profito, tiam tiu obsedite de la afero fariĝas obstina kaj fine ne povas konstati la veron kun aplombo kaj pli vasta vido. Esti regata de io malhelpas scii la veron kaj kaŭzas unu staton de eraro.

Illumiĝo ja estas tio, ke onia nedecidemo en sia koro solviĝas kaj oni ekkonvinkiĝas pri la vero.

Se vi, dank'al religia vivo, akumulas trejnajn por ne esti regata de iu ajn afero kun altigo kaj vastigo de mema konscia movo, vi povas tuŝi profundan veron kaj esti trankvila. Ĉio, kion vi vidas, ŝajnas brilanta, kaj al vi estas promesate pasigi vian vivon, kiu estas senlime bela.

## 22. Se homo mortas, ĉio per la morto finiĝas?

Ŝajnas ke multaj homoj havas tian penson: "Se homo mortas, ĉio per la morto finiĝas; nenio restas. Pro tio, dum mia vivo mi malprofitas, se mi ne faras kontentige plaĉajn aferojn." Tio estas tute erara.

Homa animo, eĉ se ĝi malaperas de tiu ĉi mondo, ĝi daŭre ekzistas en la spirita mondo tenante dumvivajn karakterizojn kaj konscion. La morto estas ĉeso de funkcio de fizika korpo.

Ĉar homa korpo estas materia, ĝi, laŭ la leĝo de la naturo, devas kadukiĝi, putriĝi kaj perdiĝi. Male, la animo eterne ne perdiĝas, ĝi neniam mortas nek maljuniĝas. Homa animo jam ekzistas antaŭ ol ĝia naskiĝo kun korpo. Dum vivado en la reala mondo ĝi loĝas en la korpo. Kaj ĉe la alveno de morto la animo eliĝas el la korpo, kaj ĝi revenas al la spirita mondo.

Se vi kun la penso, ke ĉio finiĝas ĉe la morto, vivas senlime laŭplaĉe, dume, vian animon vi ne povas eviti de vundigo, malfortigo kaj malpurigo. Kaj, ĉar la animo eterne daŭras post reveno al la spirita mondo, ĝi devas ŝuldi la kulpon kaj suferi por ĉiam.

## 23. Ĉe Oomoto, kiel oni pensas pri la vivocelo?

En la instruoj de Oomoto estas jeno:

La vera vivcel'  
kio estas? Mi respondu,  
sur tiu ĉi ter'  
establi Paradizon  
ja neniam rompeblan.

Nome, ni estas gvidataj tiel, ke

la celo de homa vivo estas konstrui sur tiu ĉi tero pacan mondon plenan de eterne daŭranta feliĉo kaj prospero laŭ la volo de Dio, la kreinto de tiu ĉi mondo.

Homoj havas siajn animojn partigitajn de Dio en siaj propraj korpoj. Kaj, nur kiam Dio kaj homo en realo pace harmonias, tiam ekestas vera aktivado dezirata al homo. Kiam iu fanfaronas, "Mi estas tiom digna kiom ne necesas Dio aŭ Budho," se tiu ne havas rilaton al Dio kaj tiu ne povas ricevi gvidon (protektion) de Dio, tiu neniel povas fari efektivan laboron konfiditan de Dio al homaro.

La vera celo de homa vivo estas tio, ke vi havu koron similan kiel tiun de Dio la kreinto, kaj vi konstruu la idealan mondon, fariĝinte kvazaŭ la mano kaj la piedo de Dio.

## 24. Ĉe Oomoto, ĉu homo estas rigardata kiel infano de peko?

Ŝajne estas tia religio, kiu rigardas homon kiel infanon de peko laŭ ties kompreno pri homa naturo. Estas ne tiel instruata ĉe Oomoto. Male, ĉe Oomoto difiniĝas tiel, ke homo, kiu estis kreita de Dio, havas la korpon kaj animon ambaŭ partigitajn de Dio.

La homaro estas infanoj de Dio kaj Dia popolo senrilate de diferenco de gentoj aŭ rasoj. Homo havas unu flankon, ke li per memprogreso povas fariĝi dio, kaj li samtempe havas alian flankon, ke li estas tentita kaj degenerigita de diversaj pekoaferoj de tiu ĉi mondo kaj li pli kaj pli kontraŭstaras Dion, rezulte de tio, liaj animo kaj korpo fariĝis esti regata de diabloj. Dio kompatas multajn homojn, kiuj mem degeneris, por tio, ke la animojn purigu kaj revivigu kiel tiajn de Dia infano, kaj Dio malfermis la vojon al instruoj de Oomoto.

Pri sankteco de homa naturo Oomoto klarigas jene:

Animo homa,  
partigita de Dio,  
la plej supera  
devas ekde komenco  
esti laŭdinde bela!

Ĉar korpo via,  
animo via apartenas  
al Dio sankta,  
vi adore respektu  
vian korpon kaj vin mem.

# Fidele al elkora krio

3

Hidemaru DEGUĈI, tradukis Eizo ITOO

## Temperamento ŝanĝiĝas laŭ spirita fluo

Mi nun volas kviete introspekti kaj ekzameni min mem.

Mi ankoraŭ nun estas duobla personeco kaj tio eble daŭros plu iom da tempo. En mia korpo ĉiam interbataladas du mastroj: “Bonanimo” kaj “Malbonanimo”. Iafoje mi ĝuas la temperamenton kvazaŭ rigardi la lunon super alta monto en la serena, pura aŭtuna nokto. Alian fojon mi sentas min perforte puŝata ĉiam pli profunden en malvastega, malpurigita vojeto interdoma. Tiam mi estas tre malgaja; sentas min kvazaŭ porti plumbe pezan ŝarĝon; sentas min sola forlasite; tute ne interesiĝas ion ajn vidi nek aŭdi; suspektas kaj timas tute sensencan aferon. Mi pensas ke tio estas “la koro de infero”.

Baldaŭ revenas la serena koro kvazaŭ aŭtuna ĉielo, ĵus menciita, kaj mi dance saltas tra la tuta korto, kiel infano. Iafoje mi ĝuas trankvilan beatecon, kvazaŭ mi senmove restus en banujo kun okuloj fermitaj, nenion pensante. Tiam mi sentas min ne destinita por vivi sur la tero. Jen “la koro de ĉielregno”.

Tiel, ĉiutage mi jen leviĝas al la ĉielo, jen falas en inferon.

Kiam mi estas kun la koro de infero, mi estas tiel malvigla, ke mi mem miras kaj abomenas, kaj estas mizere kunpremita kun ploranta vizaĝo. Tiam mi bone min komprenas, kaj tial mi penas reserenigi min for de tia mizera stato. Sed vane. Ĉio montriĝas al mi griza. Eĉ la plej bela prelego, eĉ la plej intima amiko nur min turmentas. Tiam restas al mi sola rimedo nur kviete atendi la pasadon de la tempo. Tiam mi pensas, ke en la mondo troviĝas multaj similaj homoj, kiuj peze suferadas kaj senhelpe plendadas. Mi scias, ke preskaŭ nenion utilas por tiuj homoj eĉ la plej lerta prediko, eĉ la plej bela artikolo. Por ili eĉ la figuro de Ksitigarbo (Budho de Amo) aperas kiel io timiga. Nenio helpas, ĝis kiam la koroj estos tute purigitaj alivorte

kompletiĝos la ĝenerala ekzercado de la spirita mondo. Tiel mi fine konvinkiĝis, ke oni neniel kapablas savi homojn per supraĵa homa saĝeco aŭ inteligenteco.

Feliĉe al mi daŭras la infera koro nur mallongan tempon kaj mi povas reveni al mia originala, milda koro. Tiamaniere mi povas bone gustumi kompare la du korojn tiel ke eblas al mi paciencie toleri senakcidente la tempon de malpura koro, min kuraĝigante per miaj propraj vortoj “jen ĝusta okazo por toleri!”. Sed kompatinde multaj homoj, turmentataj de tiu ĉi malpura koro, perdas esperon por vivi kaj malbenas la mondon kaj la homojn.

La homo neniel estas Dio, nek besto. Alivorte homo estas kaj Dio kaj besto. Eĉ la plej malbona fripono foje pensas bonon kaj sankton. Ĉiu homo, se li kviete introspektas en profunda nokto, ne povas ne miri pri sia malpureco.

Mi skribis vortojn “malpura” kaj “besto”. Sed mi ilin uzis neniel ekskluzive kun la senco, kiel uzas malvastkoraj moralistoj pri la karnaj deziroj de la homo. Mi uzis por esprimi la direkton kaj moviĝon de la koro. Estas necese kaj memkompreneble, ke homoj manĝas por vivi kaj naskas por prosperi. Estas granda eraro, ke ĝis nun oni nur negative traktis la menciitajn aferojn, nepre necesajn. Por servi al la granda Dia entrepreno de la kompletigo de la universo ni devas multe manĝi kaj vigle naski pozitive.

Per la vorto “malpura” mi celis la agon de egoismo kaj de kalkulemo pri profito.

Estas la nuna tempo, kiam homoj mem suferas irante krutaĵon, preterlasante la glatan, grandan vojon pretigitan respektive al ĉiu homo. Estas la modernuloj, kiuj per si mem difektas la karan vivon, kiun ili povas plene ĝui en feliĉo.

## Kontraŭnature estas ion fari aŭdace

La formo estas speguliĝo, sekvaĵo aŭ objekto de la koro.

Ni devas vidi kaj aŭdi per formo la manifestiĝon de la koro.

La vera disciplinado en ĉi tiu mondo estas nur en atenta observado de la teniĝo de koro.

La mondo de formoj estas nur rimedo aŭ helpilo por lerni la mondon de la koro. Nenio estas pli granda eraro observi la forman mondon dis de la kora mondo.

Homo kun malriĉa koro ne povas ĝui veran feliĉon, eĉ se li estu riĉulo laŭ aspekto — ĉar lia riĉeco ne estas lia vera posedaĵo. Povas esti, ke li aspektas sufiĉe feliĉa laŭaspekte, sed neniel li ĝuas vere senĝenan plezuron venantan el la fundo de la koro.



Bedaŭrinde naŭdek naŭ procentoj de la nuntempaj homoj ne scias ĉi tiun tute facile videblan veron kaj mem arestas sian koron pro alkroĉiĝo al eksteraj aferoj.

Kiel homo povas fariĝi vere feliĉa? Nur galopi al la primara vivo, jesebla en la fundo de la koro, alivorte fari la plejblan penon por aŭskulti al la flustro de sia originala koro.

Ĉiu ĉi tion deziras, sed mankas la penado ĉe plej multe da homoj.

Homo suferas, ĉar li trudas aŭ deziras tro multe al si. Ĉiu prefere estu kontenta kun tio, kion li dece ricevas laŭ sia pozicio aŭ kapablo. Sufero naskiĝas, ĉar li deziras pli multe. Post ĉio homo devas sin liberigi de mondeca honoramo kaj okupiĝi je afero, kiu plej taŭgas al lia nuna stato.

Amikoj, mi sincere konsilas! Volu forigi ĉian antaŭjuĝon por reveni al la vivo, kiu ne trompas vian koron. Nur tio sufiĉas. Kial vi bezonas turni vian rigardon dekstren kaj maldekstren kun koro maldecidema? Simple senplakigu vin kaj vi estos tute senĝena por ĉiam.

Revenu al via vera "mio" kaj marŝu la vojon vere vian!

Tigro revenu al tigro, vulpo al vulpo. Nenio estas pli granda peko, ol trompi. Sin trompi estas trompi Dion. Senbrida dezirego kaŭzas pereigon.

Kormorano agu kiel kormorano; korvo kiel korvo!

Estas peko turni sian volon eĉ je bagatela afero, tro prizorgante opinion de aliaj.

Faru ion ajn tute laŭ sia volo, nur kondiĉe, ke ĝi ne ĝenu aliajn.

Homo estas kreita tiel ke li estu agrabla kiam li okupiĝas je sia misio kaj ke li estu malkontenta, se li spitas la mision. Post ĉio, ĉiu marŝu en la direkton, kiun li ŝatas. Estas neniam vojo alia.

Se ĉio en la universo estas vere fidela al sia misio destinita, la mondo neniel suferas malordon. Ĉio estas kreita tiamaniere, ke ĝi ĝuu plej grandan plezuron kaj kontenton nur kiam ĝi plenumas sian mision.

Neniel estas malfacilaĵo koni sin mem. Homo ne eraras la direkton, se li agas laŭ sia koro. Iuj povas timi, ke la mondo fariĝos multe pli senorda, se ĉiu agos laŭ sia koro. Ili miskomprenas la esprimon "laŭ sia koro". "Laŭ sia koro" ne signifas "laŭ sia karna deziro", sed "laŭ sia vera koro" aŭ "laŭ la voĉo de la primara animo".

Strebado, ne laŭnatura, sed laŭ intrigo aŭ ia malica plano, neniam kondukos al vera sukceso. En la nuna mondo multaj homoj tion faras.

Se hazarde iuj sukcesas per tio, la aliaj, kiuj fariĝis viktimoj de la malica strebado, certe tenos rankoron kontraŭ ili. Do ankoraŭ estas nefinita la kalkulo.

Vera paco neniam por eterne venos per subpremado aŭ intrigo. Ĝi efektiviĝos nur kiam la homoj sin reciproke komprenos, cedos unu alian kaj restos en la homaj koroj eĉ ne peco da plendo aŭ malkontento.

Homoj tre ofte faras hipokriton nur timante, ke la aliaj eble pensos tion kaj alion, eble kritikos tiel kaj iel.

Homo plej plaĉas al Dio, kiam li estas vere si mem, eĉ se li montriĝus malbona en alies okuloj. Nenio estas pli kompatinda, ol homoj, kiuj pasigas la tutan vivon nur en hipokriteco pro timo pri sensencaĵoj.

Introspektante pri si mem, ĉiu povas kapjesi, kiel la homo ĉiutage turmentas sian koron pro memamo. Homo ektimas je simpla bruoj, ĉar li pensas ke ĝi estas anonco de ia danĝero al li. Subaŭdante interparolon de aliaj, homo tuj suspektas, ke ĝi eble temis lin ironie, aŭ ke ĝi estas eble pro malrespekto al li k.s., kaj pro tiaj sensencaĵoj mem kreas en si ĵaluzon aŭ rankoron kontraŭ aliaj.

Mi diris "sensaĵoj", sed kiom multe da sensencaĵoj okazas senĉese ĉirkaŭ ni? Estas ja pli ol supozeble. Ni devas severe ekzameni nin mem kaj strebi elpurigi al ni la animon komplete. Nenio estas pli granda eraro, ol la vivmaniero de nuntempaj homoj, kiuj nur penas afekti la eksterajn, ignorante la purigadon de la interna koro.

Estas ja etanimuloj, kiuj direktas tutan atenton por ornami la eksterajn, ne ŝatas ekziston de homoj superaj al ili, amas nur tiujn, kiuj faras bonon al ili kaj kiuj ĝentile riverencas ilin. Al ili tute mankas sinoferemo kaj al Dio, kaj al la homaro. Kaj tamen en la nuna mondo tio estas rekonata kiel ordinara afero kaj la homoj akre interbatalas nur pro memamo.

Ĝenerala malforta punkto de la homo estas sin reklami en ia okazo kaj fiere fanfaroni antaŭ aliaj. Kvankam la fanfarono de homo, kiu estas en unueco de ekstero kaj interno, ne donas ian malagrablan impreson pro senafekteco, oni ne povas ŝati tian homon, kia nur penas sin afekti respektinda uzante ĉiujn eblajn rimedojn. Tuj malkovriĝas lia interno kaj devigas nin ĝemspiri pro homa naturo.

Profitante la nunan okazon mi volas diri, ke la ĝisnuna moralo tro severe avertis nur la eksterajn. Pensante malbonon en la koro, oni neniel povas fari bonon en la ago. Plej grava estas la koro en ĉiu kazo.

Mankas senĝeneco al tiu, kiu suferadis la tutan tempon. Mankas severeco al tiu, kiu nur facile travivis.

Ideala estas tia homo, kia estas kaj malmola kaj mola; kaj forta kaj malforta; kaj simpla kaj persista; kaj senĝena kaj severa; ofte ridas, ofte ploras.

La publiko havas la kutimon nomi sanktulo tian homon, kia kun rigida sinteno

malavare superŝutas formalajn ĝentilaĵojn.

Eraro!

Ni ne devas trudi ion al alia. Ne enpuŝu, sed donu nur tiom, kiom li ricevas. Igu lin kompreni nur kiom li kapablas, kaj poste lasu lin fari, kiom li volas.

## Ĉio estas produktaĵo de penso

Transŝanĝiĝado de energio estas leĝo de la naturo. Se homo pene retenadas la elmontriĝon de kolerego naskitan en la koro, la energio kreita de la kolerego ne eviteble pleniĝas en la interno de la korpo kaj venenas ne nur la animon, sed ankaŭ la korpon.

Kiam homo ĝojas, en li naskiĝas energio de ĝojo, kiu disvastiĝas por meti ĉirkaŭajn homojn ankaŭ en ĝojan atmosferon. Inverse, kiam li malĝojas.

Se homo rigardas antaŭen kun koro kvietigita, li trovas vojon tie nature etendiĝantan. Li ne bezonas fari turmente severan sindisciplinon por ĝuste direkti la paŝojn. Li simple marŝu, kiam li volas marŝi, kaj la piedoj per si mem antaŭen iros.

Multaj homoj en la nuna mondo hezitas iri la glatan grandan vojon tuj antaŭ sia nazo kaj aparte konstruigas alian vojon kaj poste penas science trovi bonan rimedon antaŭen iri.

Ne estas bone juĝi ies agon bona aŭ malbona nur laŭ ĝia eksteriĝo. Tre malofte troviĝas homoj, kiuj elkore planas malbonon. Ĉiu ago havas sian motivon, al kiu ni do devas doni certan simpatian. La kaŭzo de homa ago estas tre delikata kaj malsimpla, kaj cetere ĝi estas kreita naŭdek naŭ procente per la cirkonstancoj. Tial ni estu kiel eble plej toleremaj pri alies ago, revidante kaj reaŭdante ĝin.

En la mondo estas multaj aferoj, kiujn oni povas pensi neeviteblaj sur la loko de la koncerna persono. La proverbo prave konsilas: "Malamu pekon, sed ne la pekulon". Ĉar en ĉiu okazo la homo ne faris ion, sed estas devigita fari, la plej grava afero estas, ke ni indulgu unu la alian.

Memkonscio pri sia alta pozicio aŭ kapablo, kiel ankaŭ fiksita konsidero pri ies rango aŭ posteno ekz. ke li estas doktoro aŭ ministro, faras malhelpon kontraŭ natura interrilatiĝo kun li.

Por homo la tuta vivo estas la periodo de sindisciplinado. Havante kvardek jarojn, eĉ kvindek jarojn, homo ne devas ŝpari laboron nek sin deprimigi pro konscio pri la aĝo. Homo ĉiam pensu, ke li ankoraŭ estas suĉinfano, malgraŭ kia ajn aĝo. Indiferente al laŭdo aŭ mallaŭdo de la aliaj, li ĉiutage nur sin disciplinadu por progresi almenaŭ iom post iom. Pensante, ke li vere estas ankoraŭ suĉinfano, homo ne bezonas honti nek emas fieri. Se homo tuj ekkoleras aŭ ofendiĝas pro alies bagatela konduto al li, tio venas de lia memfieremo pri sia plena matureco.

Mi hontas la hieraŭan koron, ĝin juĝante per la hodiaŭa koro. Eble morgaŭ mi taksos la hodiaŭan koron absurda.

Nia ĉiutaga vivo estas kvazaŭ la akvo kiu fluas, penetrante la amason da velkinta foliaro, jen kunpuŝiĝante al rokoj, jen trankvile tra vasta kamparo, jen rapide inter domoj de gaja vilaĝo...

Homo estas amata, ĉar li amas. Ĉar iu lin amas, li tiun amas.

Homo estas prizorgata, ĉar li respektas. Ĉar iu lin prizorgas, tiun li respektas.

Sen doni sian animon, oni ne povas ricevi alies animon.







Aizendo: nova preêjo konstruita por celebri la 80jara jubileo de la Oomoto-misiado en Brazilo